



ESPÉRANTO-NORD

Fédération d'espéranto des régions Nord-Pas-de-Calais & Picardie

PROTOKOLO DE KUNSIDO DE LA FEDERACIA KOMITATO

Dato: 15an de Marto 2014

Loko: MRES, 23 rue Gosselet - Lille

Tagordo:

- 1) Venonta federacia kongreso
- 2) Ekzamensesioj: KER - ekzamenoj kaj FEI - ekzamenoj
- 3) Financa bilanco de Stella Maris 2013
- 4) Programo kaj aliĝilo por Stella 2014
- 5) Norda Gazeto
- 6) Kiel renovigi kaj plibonigi la agadojn de niaj kluboj ?
- 7) U.K. Lille 2015 kaj la 12an de aprilo 2014 (renkontiĝo en Lille de la LKK)
- 8) Diversaĵoj

Kunvokitoj:

	Ĉeestis	Senkulpiĝis	Ne ĉeestis
Michel Dechy prezidanto (Lil)	X		
France Valet, vicprezidanto (Lil)	X		
Katja Boen, sekretario (Lil)	X		
Xavier Vilain, kasisto (Dun)	X		
Edmond Plutniak (Ar)	X		
Arlette Plutniak, (Ar)		X	
Xavier Dewidehem (Lil)	X		
Claude Longue-Épée (Lil)	X		
Richard Valet (Lil)	X		
Jean Dietrich (Val)		X	
Jacky Ramon (Ar)	X		
Cyrille Decouture (Pik)			
Catherine Lévêque (Pik)			
Joëlle Muller (Ar)	X		
Thérèse Dequidt (Lil)			

Ankaŭ ĉeestis Didier Touller, nova prezidanto de Arras-Espéranto.

12 komitatanoj ĉeestas aŭ estas reprezentataj: la kvorumo estas atingita.

1. La venonta federacia kongreso

Post pluraj sensukcesaj esploroj en diversaj lokoj, Michel Dechy decidis organizi nian kongreson en la Salono Masquelier en Villeneuve d'Ascq (la klubo LVE rajtas senpage pruntepreni salanon en Villeneuve d'Ascq unufoje jare).

La programo de la tago kompreneble inkluzivos la jaran Ĝeneralan Asembleon, sed antaŭe ni (dum 45 minutoj) dividiĝos en tri diskuttablojn (kun membroj el diversaj kluboj): tablo pri informado (niaj retejoj, la Norda Gazeto...), tablo pri instruado (pridiskutante la novajn eblecojn enkonduki Esperanton en bazajn lernejojn pere de la novaĵoj en nia instrusistemo), tablo pri la agadoj de niaj kluboj (kiamaniere plivigligi tiujn agadojn). Post la Ĝenerala Asembleo, la grupoj resumos la diskutojn de la diversaj tabloj. Ni invitos la urbestron de Villeneuve d'Ascq (pro la urbaj balotoj ne tro klaras kiu estos la urbestro) partopreni honorvinon. Katja Boen mendos bufedon ĉe Flunch.

Posttagmeze ni povus unue ludi, petante de Laurent Zibell kaj Caroline Huyard ke ili helpu nin (ili organizas ĉiumonate ludvesperon en Lillo, en la "Café Citoyen". Poste, je la 15:30, ni vizitos la muzeon LAM en Villeneuve d'Ascq (Lille Métropole Musée d'art moderne, d'art contemporain et d'art brut).

Ni antaŭvidas ĉeeston de pli-malpli 30 homoj (ĉar la antaŭan tagon okazos kunveno por la UK Lille 2015, kelkaj LKKanoj el aliaj regionoj verŝajne partoprenos). Ne estos koncerto, kaj la prezo povos esti iom pli malalta ol lastjare (25 eŭroj). Urĝas nun prepari la aliĝilon: M.D. kaj K.B. redaktos ĝin, France kaj Richard Valet zorgos pri sendado.

2. Ekzamensesioj

Skipo en Araso pretas denove organizi KER ekzamenojn la 17an de Majo (elektita tutmonda tago). Eblos trapasi tiujn ekzamenojn je tri niveloj: B1, B2, C1. Sin anoncis jam 7 kandidatoj el Araso. La kandidatoj devas rete rilati kun Katalin Kováts por aliĝi al la sesio.

Diskuto sekvas pri la prezo de la ekzamenoj ĉar la federacio dufoje jam finance helpis, pagante la plej granda parto de la kotizo (la ekzamenoto pagas nur 10€ (por ĉiu ekzamenparto, 10 € por la skriba parto kaj 10€ por la parola parto) sed la prezo estas 64€ por B1, 67€ por B2 kaj 84€ por C). Xavier Vilain klarigas ke la federacio pagis 491€ en 2012 kaj 705€ en 2013. Ĉar la federacio havas monrimedojn, la komitatanoj decidis daŭrigi tiun helpon.

La FEI ekzamenoj okazos la 22an de junio en MRES kun financa helpo de la kluboj.

3. Financa bilanco de Stella Maris 2013

X.V. klarigas ke la financa bilanco de Stella Maris 2013 ne ankoraŭ pretas, tamen li jam povas diri ke ĝi estos iom pozitiva aŭ almenaŭ ekvilibra.

4. Programo kaj aliĝilo por Stella 2014

Edmond Plutniak klarigas ke la tuta programo estas jam preparita, krom la programo por komencantoj. Katalin Kováts ĉi-jare gvidos programon por la helpantoj dum la UK en Lillo. La celo estos klerigi ilin por ke ilin povu pli facile helpi eksterlandanojn kun praktikaj problemoj, deĵori ĉe ĝiĉeto... M.D. plezure akceptas gvidi la komencant/int/ojn.

Ĉar ni festos Georges Lagrange, Pascal Vilain akceptis gvidi atelieron pri la verkado de Georges Lagrange. Estos denove ateliero pri korusa kanto kun Franjo Leveque.

Sabate okazos koncerto de Jomo kiu eldonos septembre novan diskon kun okcitanaj kantoj.

Dimanĉon posttagmeze ni ludos per "Risko" kaj la diversaj atelieroj prezentos siajn atingojn.

E.P. emfazas la fakton ke tiu semajnfino en Stella estas afero de ni ĉiuj kaj petas nin entuziasme reklami pri la aranĝo. Ĉi-jare la prezo estos la sama kiel lastan jaron: 85€

5. Norda Gazeto

Xavier Vilain parolas pri la prezo: ioma plialtiĝo pro presado kaj sendokostoj. Kelkaj homoj abonas la Nordan Gazeton pagante 8€ kaj estus pli facile se ili povus aliĝi al la federacio kiel individuaj membroj.

Claude Longue-Épée klarigas ke post la UK en Lillo, li ne plu zorgos pri la gazeto kaj necesas trovi anstataŭonton. Ĝis nun neniuj proponis.

6. Kiel renovigi kaj plibonigi la agadojn de niaj kluboj ?

Xavier Dewidehem diras ke ĉe UFE oni preparolas tiun problemon. La prelegturneoj organizataj de Yves Nicolas ĉiam estas grandaj sukcesoj kaj revivigas la klubojn. K. B. parolas pri sia vizito al la klubo de Barcelono kiu havas ĉiusemajnan tute neformalan diskutrondon en kafejo de iu kultura centro, X.D. parolas pri la vizito de Claeys Magalhaes: li invitis amikojn kiuj dank'al tiu vizito, al la diskutoj kaj tradukoj ekinteresiĝis pri Esperanto.

7. U.K. Lille 2015 kaj la 12an de aprilo 2014 (renkontiĝo en Lille de la LKK)

La skipoj jam laboras kaj la LKK kunsidos en Lille, en la *Grand Palais* sabaton la 12an de Aprilo. Matene la LKKanoj vizitos la kongresejon, kaj fine de la mateno kaj posttagmeze estos diversaj kunvenoj. Oni plu serĉas responsulo pri tradukado kaj helpantoj.

Aparta asocio estas kreata por Lille 2015. Tiamaniere la spezoj estos pli bone apartigitaj. X.D. tre baldaŭ deklaras ĝin en la prefektejo. X.D. estos la prezidanto de la asocio en kiu membriĝos LKKanoj kaj honoraj membroj. Estus bonege ke la nombro de honoraj membroj atingu 100: la 100 honoraj membroj por la 100a UK.

Vendredon la 11an de Aprilo estos ankaŭ kunvenoj kun publikaj instancoj ĉirkaŭ *Lille 3000* en 2015.

X.D. kaj M.D. intencas ĉeesti la kongreson en Bona Aero kaj tie reklami pri la UK en Lille.

8. Diversaĵoj

Edmond Plutniak dividas kun ni kelkajn ideojn pri kiuj Arlette kaj li pensas por la UK en Lille:

- Gaston Waringhien naskiĝis en Lille. Kial ne klopodi meti ŝildon sur la domon kie li naskiĝis?
- Rilati kun la pianisto Andrei Korobeinikov kiu pretas senpage ludi por la UK (aliaj komitatanoj pensas ke la agento de Korobeinikov ne akceptos tion).
- Rilati kun Jo Haazen el Antverpeno kiu estas fakulo pri kariljonoj kaj pretas ludi en Lille.
- Rilati kun Hervé Gonin kiu havas mirindan kolekton da muzikinstrumentoj. Eventuala ekspozicio en Lille? H.G. ankaŭ kapablas ludi multe da tiuj instrumentoj.
- Prelego de Alain Dawson, fakulo pri la Pikarda.
- Diplomatestilo de UEA (rete elŝutebla) pri ĉeesto en la 100a UK.
- Kongresaj poŝtmarko kaj poŝtkartoj: X.D. klarigas ke Raymonde Coquisart jam laboras pri tio.
- Aŭdigi en la kongresejo la esperantigitan version de la kanzono *Dors, min p'tit quinquin*. Estas pluraj tradukoj, inter kiuj unu de Raymond Schwartz.

Redaktita de Katja BOEN